

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk




Fondita 1952


Numero 4

Septembro/Oktobro 1976



Via 20a jarkunveno en Paderborn/Orientvestfalia



Saluton el Paderborn 



Paderborn atendas vin

Paderborn atendas la jubilean jarkunvenon

La internacia kongreso de la fervojistoj kunigis kelkajn centojn en Nordsvedio. Ankaŭ la grandstila universala kongreso en la greka metropolo apartenas al la pasinteco. Alproksimiĝas la aŭtuno kaj kun ĝi la tradicia jarkunveno de la Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA). Inter la 15a kaj 17a de Oktobro 1976 ni renkontiĝos en la orientvestfalia urbo Paderborn.

Post 19 bone sukcesintaj jarkunvenoj ankaŭ la 20a kunveno promesas esti alloga kaj vizitinda. En Paderborn Esperanto gajnis dum la lastaj jaroj firman pozicion per la klopodoj de konataj aktivuloj, precipe pro iliaj modernaj lerno- kaj instrumentadoj. Tiuj aktivuloj certigos sukcesplenajn aranĝojn.

Kiel kutime estu permesata retrorigardo al la historio de la kongresloko. La tiea regiono ŝuldas la loĝigon depost 2000 jaroj al geologia fenomeno: la Paderfontoj. El subtere fluantaj akvoamasoj premas supren ses fontobazenoj. Ili formas mallongan riveron, kies nomo estas parto de la nuna urbonomo. La imperiestro Karlo la Granda aranĝis en la palatino sian unuan kunsidon, renkontis tie la papon kaj preparis la restaŭrigon de la romia imperio. Tiuj klopodoj ligitaj kun konstantaj vojaĝoj de unu palatino al la alia kredeble estis sukcesplenaj; Paderborn profitis de vigla konstruperiodo dum du jarcentoj. Oni starigis grandegan katedralon, kelkajn monaĥejojn kaj ĉirkaŭ ĉio fortikaĵojn. Ekfloris komerco kaj kulturo. Tamen, en la 13a jarcento, okazis konfliktoj inter la episkopoj, kiuj ja estis ankaŭ regantoj de la teritorio, kaj la urbanoj, kies reputacio kreskis kun ilia prospero. La episkopo establiĝis en eksterurba rezidejo. Paderborn fariĝis Hanse-urbo. En la 16a jarcento la nova konfeso de Luther etendiĝis, sed devis ĉesi al la kontraŭreformacia agado. Starigis universitato de la jezuitoj. La sekva 30jara milito alportis multajn mortintojn kaj ruinigitan urbon.

Relative longe, nome pli ol 150 jarojn, daŭris la arde dezirita paca periodo, markita precipe per forta konstruagado. La novordigo de la teritorio komence de la 19a jarcento finigis la eklezian regadon samkiel ekz. en Fulda kaj Bamberg. Paderborn apartenis al la reĝa regno Prusio escepte de kelkaj jaroj, kiam ĝi estis franca posedaĵo. La dua mondmilito alportis denove ruinojn kaj administraciajn ŝanĝojn. Prusio ne plu ekzistis depost 1945. Oni kreis la provincon Nord-

rejnvestfalion, al kiu la urbo Paderborn nun apartenas. El ruinoj kreskis denove belaspekta ekonomia kaj kleriga centro, kie krom institutoj kaj altlernejo ankaŭ industrientreprenoj havas gravan pozicion.

Tie do GEFA okazigos sian venontan jarkunvenon, al kiu vi estas kore invitata. La oficiala programo estas aparte publikigita; ĝi enhavas la kutiman gazetarajn konferencon, laborkunsidojn, lingvajn ekzamenojn, festvesperon kaj matineon. Ne mankos visito al la vidindaĵoj de la urbo. La aŭtobusa ekskurso sabatposttagmeza kondukos al la Teŭtoburg-montaro. Ni vizitos gigantan monumenton, kiu atestas pri la venko de la germanoj sub la ĥeruska gvidanto Hermano super la romiaj legioj. Alia celo de tiu ekskurso estos la Eksternŝtonoj. Temas pri krudaj rokoj, parte viziteblaj per ŝtuparoj kaj pontoj, kiuj servis dum partempoj supozeble kiel kulta künvenloko. Eble la programo estas iom tro abunda por unu semajnfino. Pro tio estas rekomendinde aldoni unu/du tagojn. Paderborn ofertas sian konatan gastamecon. Ke ankaŭ eksterlandaj gekolegoj estas kore bonvenaj, ne devas esti akcentate. Aliĝu eble plej baldaŭ al la 20a, la jubilea jarkunveno de GEFA.

W. B.

Jahresversammlung 1976

Unsere 20. Jahresversammlung findet vom 15. – 17. 10. 1976 in Paderborn statt. Falls Sie sich bisher noch nicht angemeldet haben, so holen Sie dies bitte sofort nach. Wir werden uns bemühen, auch jetzt noch weitere Unterkünfte zu beschaffen. Soweit noch nicht geschehen, können Anmeldevordrucke beim zuständigen Bezirksbeauftragten und beim Sekretariat unserer Vereinigung angefordert werden.

Sprachprüfung

Falls Sie sich noch nicht angemeldet haben, setzen Sie sich bitte umgehend fernmündlich mit dem Vorsitzenden des GEFA-Prüfungsausschusses
Fritz Lautenbach 957/822/122
in Verbindung (siehe Bulteno 2/1976).

Empfangsbüro

befindet sich im Bahnhof — 1. Etage des Dienstgebäudes (Unterrichtsraum) von Bahnsteig 1 aus erreichbar.
Öffnungszeiten:
Freitag, 15. 10. von 16.00 bis 22.00 Uhr und Samstag, 16. 10. von 8.00 bis 19.00 Uhr
Nach Ihrem Eintreffen in Paderborn Hbf holen Sie bitte dort die Tagungsunterlagen ab und zahlen die Teilnehmergebühr von 9,— DM für Mitglieder und 5,— DM für Angehörige. Ebenfalls erhalten Sie dort die Eintrittskarte — Preis in der Teilnehmergebühr enthalten — für die Samstagabend-Veranstaltung und den Busausflug am Nachmittag des gleichen Tages. Im Empfangsbüro können Sie auch Ihre Essengutscheine erwerben.

Esperantobalo en Ĉeska Trebova.

Nia kolego Heinz Schindler el Schwelm vizitis niajn kolegojn kaj raportis: La 15an de Februaro 1975 okazis la 6a Esperantobalo en Ĉeska Trebova (Böhmisch Trübau), al kiu invitis la tiea Esperanto-rondeto „Amikeco“. En la ornamita salono de fervojista klubo kunvenis 340 Esperantistoj kun parencoj kaj geamikoj. Kolego Jiri Pištora salutis la ĉeestantojn. Poste bona orkestro ludis agrablajn melodiojn. Mi ne nur povis admiri la multajn belajn virinojn, sed ankaŭ iliajn belajn festrobojn. Ĝis post la 3a horo matene ni dancis, parolis kaj amuzis.

Por mi jam estis la dua dancvespero tie, ĉar dum la antaŭa vespero la patro de mia amiko Svatopluk Ĉech kun la tuta familio kaj kelkaj kolegoj festis sian emeritigon en gastejo, kie ni ankaŭ dancis ĝis post noktmezo.

Iam mi denove vizitos tiun belan feston en amika rondo. Dum la reveturado mi ankoraŭ vizitis amikojn en Podebrady kaj Praha kaj partoprenis en Esperanto-klubversperoj tie.

UK 1976 en Grekujo

La kuraĝo okazigi la 61an Universalan Kongreson de Esperanto en Grekujo meritas ĉies respekton. La metropolo Ateno, lulilo de la eŭropa kulturo kaj nuntempe ĉefurbo kun 2,2 milionoj da enloĝantoj, gastigis inter la 31a de Julio kaj la 7a de Aŭgusto ĉ. 900 kongresanojn. Pluaj 200 personoj estis aliĝintaj, sed ne venis. La UK ĝuis vastan reputacion, kion atestis i. a. okaze de la malfermo la ĉeesto de multnombraj reprezentantoj el la publika vivo. Ankaŭ la ambasadejo de la FR Germanujo apartenis al la salutintoj.

La plej multaj kunvenoj okazis en la altlernejo Pantios, taŭga kongresejo kun klimatizitaj salonegoj. Altkvalitaj prelegoj renkontis rimarkindan intereson. Ankaŭ la fervojistoj havis sian fakan kunvenon sub la gvido de la IFEF-ĉefkomitatano Greutert/Svislando. Bedaŭrinde mankis grekaj kolegoj. Temoj estis la pasinta kaj la estonta IFEF-kongreso krome organizaj demandoj. El la multnombraj programeroj estu menciataj demandkonkurso, greka vespero en subĉiela teatro, bankedo kaj balo en la luksa hotelo Hilton, teatra vespero prezentita per la bulgara trupo, diservoj, arta vespero duone dediĉita al la mortinta hungara verkisto Kalocsay, ekskursoj per aŭtobusoj kaj ŝipoj al famaj kulturaj lokoj. Multo efektiviĝis sub multnombraj malfacilaĵoj, kiujn la nelaca LKK klopodis venki. D-ro Tonkin, la prezidanto de UEA, dankis dum la fermo per varmaj vortoj al ĉiuj kunlaborintoj, antaŭ ol la flago transiris al la LKK de la venontjara UK en Islando.

Ĉ. 100 postkongresanoj ĝuis tritagan krozadon en luksa ŝipo, kiu kondukis ilin al la mediteraneaj insuloj Mikonos, Rodos, Kreto kaj Santorin. Supozeble tiu estis unu el la plej belaj postkongresoj kaj por kelkaj la unua okazo rajdi azenon. Posteriore rigardite la malgataĵoj perdas sian gravecon, eĉ la streĉa vojaĝo per la fervojo.

W. B.

Das Wichtigste dieser Ausgabe in Deutsch
Seite 2: Paderborn erwartet die

Jubiläums-Jahreszusammenkunft.

Redaktifino por n-ro 5/1976
estas la 10. 11. 1976

Lingva angulo N-ro 7

El la Regularo Esperanta

Jen la dekdua ĝis dekkvara el la
16 REGULOJ:

- (12) Ĉe nea vorto la vorto „ne“ estas forlasata.
- (13) Por montri direkton, la vortoj ricevas la finaĵon de la akuzativo.
- (14) Ĉiu prepozicio havas difinitan kaj konstantan signifon; sed se ni devas uzi ian prepozicion kaj la rekta senco ne montras al ni, kian prepozicion ni devas preni, tiam ni uzas la prepozicion „je“, kiu memstaran signifon ne havas. Anstataŭ la prepozicio „je“ oni povas ankaŭ uzi la akuzativon sen prepozicio.

Unterstreichen Sie die richtigen Wörter (in Klammern).

1. La ventego (terurigis / teruriĝis) la ŝipveturadon.
2. Post longa vintro ree (printempigos / printempiĝos), jam (aŭtunigas / aŭtuniĝas) kaj bruas la vento.
3. Mia ĉapo, flugante, (pendigis / pendiĝis) sur la branĉo de la arbeto. (Z)
4. La mastro (igis / iĝis) la serviston, (veturi / veturigi) la ĉaron en la grabejon.
5. Unue li (enlitis / enlitiĝis) siajn gefilojn, poste li (enlitis / enlitiĝis) mem.
6. Ĉar mi volis mem (ripozi / ripozigi), mi klopodis (ripozi / ripozigi) la infanojn.

Vervollständigen Sie folgende Sätze:

**Zögern Sie nicht,
Ihr Wörterbuch zu benutzen!**

Plezuro estas sento,

Pudingo estas

Dando estas viro,

Geografo estas specialisto,

Humoro estas stato de

Kamfiono estas forta

Nekrologoj

Denove la morto postulis viktimojn el niaj vicoj. La 18an de Julio 1976 forpasis nia emerita membro

Alfred Dawid, Opladen

Li devenis el Oppeln (Suprasilezio), kie li naskiĝis en 1895. Li jam esperantiĝis post la unua mondmilito, fariĝis membro de LEA kaj dum jaroj instruis Esperanton. Dum la 12-jara regado de Hitler ankaŭ li daŭre devis timi esti punata. Du junaj esperantistoj el Oppeln siatempe mortis en koncentrejo. Li mem estis ĝustatempe avertita. Ĉar li ne estis membro de la partio, li ne fariĝis oficisto, eĉ dum kelka tempo estis maldungita de la fervojo. Sekve de la konataj eventoj Dawid devis translokiĝi en 1951 de Oppeln kun la tuta familio al Opladen. Tre baldaŭ li konatiĝis kun lokaj esperantistoj kaj denove eklaboris inter la fervojistoj, sed ankaŭ ekstere de la fervoja medio, ekz. en la popolaltlernejo. Ankaŭ la nuntempan vicprezidanton li entuziasmigis por nia lingvo. Kelkajn jarojn li oficis kiel komisiito por la BSW-distrikto Wuppertal. Senlace eĉ post la emeritiĝo li daŭrigis sian agadon. Sincere ni funebras pri la modesta, ĉiam fidinda kolego kaj membro. Li estis unu el tiuj Zamenhofanoj, kiu sian tutan vivon dediĉis al la progresigo de la Internacia Lingvo, fakte pli ol 50 jarojn. Al la vidvino ni aparte kondolencis.

Alfred Dawid ripozo en paco.

La estraro

Hazarde ni eksciis, ke jam en Marto 1975 forlasis nin

Jakob Schneider,

Membro de la grupo Kaiserslautern.

Am 21.4.1976 verlor die Gruppe Stuttgart ein langjähriges treues Mitglied,

Adolf Stümpfig.

Die Gruppe Karlsruhe bedauert den Verlust ihres Mitgliedes

Willi Rothmann,

der am 30.5.1976 in Karlsruhe verstorben ist.

Den Familien sprechen wir unsere aufrichtige Anteilnahme aus.

GEFA